

& Marinjo Magdon:

< Rekante 33 el 61 batoj por strofo, entute 671 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Bohemaj grenatoj) dediĉe al Petr Bezruč. Baladigis Martin Strid (2016) per ĉeĥa popolmelodio modifita kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

(# Ej, lásko, lásko:

/hdolre mifa milre3 do mi3so sofa3 mimi; hdolre mifa milre3 do mi3so sofa3 mimi;
fafa3 falso falmi3 re lala3 sofa mimi; fafa3 falso falmi3 re lala3 sofa mi;

(#Rekantaĵe: soso laso fa mi; rere remi fa lmi re; rere rere remi fa; somi mimi mifa so;
laso laso fa mi; rere rere remi fa; somi mimi mifa so; laso laso fa mi)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 Ma2gdon malju2na el Ostrava
hejmen ; i2ris vespe2re kaj haltis je
brando; falis e2n fo2son kun kap'
disrompita - ; hejme tre2 plo2ris
Marinjo Magdon.

(×: **Vivo vigle rulas ; Fajro flame
bru2las ; Kion meti por kuir? ; Orfoj
ploras en sopir' ; kaj malsato regas ;
Kion meti por kuir? ; Orfoj ploras en
sopir' ; kaj malsato regas.**)

'2 Karbovagon' renversiĝis sur relo, ;
sub ĝi elspiris* vidvino de Magdon. ;
Orfoj kvin ploris en Hamro Malnova, ;
kaj pleje plejaĝa Marinjo Magdon.

'3 Kiu nun ilin adoptos, satigos? ; Ĉu vi
por ili nun estos gepatroj? ; Ĉu
minejstro la koron posedas, ; kiel vi
sama, Marinjo Magdon?

'4 Finon ne havas markiza arbaro. ;
Kiam la patron mort' trovas en mino, ;
lignan fasketon, ĉu orf' preni povas? ;
Pensas vi tion, Marinjo Magdon?

'5 Frostas, Marinjo, kaj mankas
manĝaĵo. ; Plena montaro de branĉoj
kaj ligno. ; Vidis urbestro vin,
Hochfelder, ŝteli, ; ĉu li silentos,
Marinjo Magdon?

'6 Kian fianĉon vi al vi elserĉis? ;
Plumon sur ĉap' kaj pikilon ĉe brako, ;
frunton severan, kaj vikun li iras. ; ĉu
en Frydekon, Marinjo Magdon?

'7 Strange vi amas lin. Kapo klinita;
viajn okulojn vi kaŝas per tuko, ; kaj en
ĝin fajraj enfluas larmetoj. ; Kial vi
ploras, Marinjo Magdon?

'8 Burĝoj en Frydek kaj la sinjorinoj ;
mocos pri vi kun mieno malica;
Hochfelder vidos vin tie en ĉambro: ;
Kiel vi fartas, Marinjo Magdon?

'9 Flanke, Marinjo, rok' staras tre kruta,
; fluas apude kaj bruas rivero, ; ŝaŭma,
sovaĝa jen Ostravica. ; Ĉu vi ĝin aŭdas,
Marinjo Magdon?

'10 Salto maldekstren kaj ĉio finiĝas. ;
Via hararo kaptiĝis sur roko, ; sango
makulis la blankajn manetojn, ; Di' kun
vi estu, Marinjo Magdon.

'11 En la tombejo ĉe muroj la tomboj, ;
krucoj kaj floroj sur ili ne estas. ;
Mommortigintaj ĉi-tie nur kuŝas. Kuŝas
eĉ tie Marinjo Magdon.)